# HEJS

**BULTENO DE LA HISPANA ESPERANO - JUNULARA SEKCIO**

Nro. 13

Julio-Aŭgusto 1960

REDAKTORC Sro. *José M.ª Cuñat*

*Sto. Valseca, 2, 1.º, 2.ª* Barcelono *(Hispanujo)*





Clisés ROLDAN

Jen bildo pri la Esperanto-Ekpozicio okazit en Sabadell.

8-2

# LA VENKO DE ESPERANTO

Ekzistas ankoraŭ pluraj esperantistoj kiuj dubas pri la sukceso de nia lingvo, malgraŭ tio ke diversaj institucioj oficialaj akceptis aŭ rekomendis ĝin. Kiu legas ofte niajn esperantaĵojn povas konstati ĝis kia grado Esperanto enkondukiĝis en la plej diversaj teknikaj aŭ sociaj medioj. Tiu estas fakto nerefutebla.

Aliaj samideanoj sincere rekonas ĝian praktikan utilecon kaj evidentan neceson; sed ili malesperas kiam konstatas ke la progresado de la internacia ilo estas malrapida kaj nekontentiga. Kaj pro tio ili konsideras la oficialigon de Esperanto kiel taŭga kaj unika rimedo por la enradikigo de Esperanto.

Ni ekzamenu iomete la aferon: Kompreneble la tuja akceptado de Esperanto kaj ĝia baldaŭa oficialigo konsistigas certe grandegajn kaj dezirendajn celojn; sed verdire tiaj senpacienculoj forgesas ke la tempo-faktoro ludis kaj ludas gravan rolon en la disvastigadon ne nur de Esperanto, sed ankaŭ de kia ajn ideo, teorio, sistemo aŭ simpla novaĵo. Ĉia scienca, morala, religia aŭ socia reformo postulis ĉiam longan prov-periodon por atingi plene veran kaj solidan sukceson. Tie do, Esperanto ne estos escepto ĝi devos evoluadi laŭ reguloj ĉiu leĝoj naturaj.

Rilate la oficialigon de la internacia lingvo, oni povas serioze starigi la jenan demandon: Ĉu nia lingva kono estas plena kaj konsekvence, ni estos tute preparitaj kiam okaze de la menciita oficialigo ni estos devigataj plenumi la eblan pedagogian rolon?

Fine, ne supozu min skeptika, kontraŭe, mi asertas ke Esperanto ne nur venkis sed ke ĝi neniam pereos.

Kial? Unue ĉar ĝi estas vera socia fenomeno, kaj due tio: se ni traleĝas atente la universalan progresadon de l'homaro ni konstatos ke ĉia projekto enhavanta implicitan veron, pli frue aŭ pli malfrue triumfis per si mem.

Tiu konkludo meritas almenaŭ esti rememorigata.

Jaime Aragay Pujols.

ALTKVALITA ESPERANTA EKSPOZICIO EN SABADELL

Laŭ speciala invito de la Urbestrara Organiza Komitato, nia Grupo havis la bonŝancan eblecon aranĝi Esperantan Ekspozicion oficiale envicigita kaj anoncita en la programo kiu estis distribuata de la Urbestraro al la tuta sabadella enloĝantaro (nuntempe 100.000) okaze de la fama tiel nomata "Granda Festo" (Festa Major).

La inaŭguro okazis la 30-an de julio kun ĉeesto de aŭtoritatuloj, estraranoj de la Centra Kooperativa Sidejo kaj estraranoj de nia Grupo kiel organizantoj.

Bele kaj detale aranĝitaj Fakoj pri: Unesko kaj Esperanto - Blindula Esperanto Organizaĵo - Universala Esperanto Asocio - Turismo - Gazetara - Filatelio, Poŝtstampoj, kaj Vinjetoj Esperantaj - Hispanaj Esperanto Kongresoj - Hispana Esperanto Movado - kaj Universala Esperanto Movado tuttempa, donis ampleksan, seriozan kaj bonan impreson al la vizitantoj (laŭ kalkulite ilia nombro estis prok. de 400), kiuj senĉese vizitadis la ekzpoziciejon dum la tuta semajno ĝis la 7-an de aŭgusto kiam okazis la fermo.

Tre klara kaj grandlitera tola afiŝo fiksita laŭlarĝe de la strato, avertis jam de malproksime al ĉiu superstrataj preterpasantoj pri la Ekspozicio anoncita laŭ tre altira titolo "Hieraŭ kaj Nuno de l'Esperanto".

Estas menciinda la fakto ke jam en la inaŭguro same kiel en la fermo, honoris nin la ĉeesto de eksterlanda esperantisto, tre bona amiko de nia Grupo, S-ro Stocker Lorenz el Knittelfeld (Aŭstrio) kiu en ambaŭ okazoj paro lis kaj esprimis veran ĝojon pro la atingita sukceso de nia Grupo.

Ankoraŭ restas freŝaj en nia memoro la feliĉe okazin taj aktoj honore de D-ro Zamenhof dum la pasinta jaro 1959, kiuj kulminis kun grandioza sukcesa inaŭguro de Zamenhof-strato; ĉi-jare la raportita Ekspozicio estas nova stimulo por ke nia grupo strebu kun plej varma entuziasmo en la organizado de novaj kaj seriozaj aranĝoj kiuj digne sukcesigu nian Movadon tiel kiel ĝi meritas.

L. Puig

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

DEZIRAS KORESPONDI kun janula hispana samideano: F-ino, Narinjo Kalandrová. Dobrovského 46. BRNO-12. CEKOSLOVAKIO.

# INFORMACION

En el Club Madrileño de Esperanto se han registrado en los - dos últimos meses, numerosas actividades: Así lo indican las visitas de los siguientes samideanos: Sres. Young y Sres. - Wiltshire, ambos de Aukland (Nueva Zelanda). Sr. Eskil Svane, de Copenhague, (Dinamarca). Y finalmente el s-ano Angelo Lovati de Milan, (Italia) que lo hizo como guía de una caravana de autocares en viaje por diversas regiones de España.

Hemos sabido también que, una proyección de diapositivas en color, fué ofrecida en el Instituto de Esperanto en Barcelona, por un sacerdote esperantista católico alemán cuyo nombre no nos ha facilitado nadie.

Los esperantistas de Sabadell celebraron con éxito, la exposición sobre Esperanto, dentro del cuadro de actividades culturales habidos con motivo de la Fiesta Mayor de aquella importante ciudad catalana. En otra parte de este boletín, ofrecemos un artículo de nuestro colaborador Llibert Puig, sobre la mencionada exposición.

En la ciudad de Olot (Gerona), donde apenas se conocía el Esperanto, se realizó un curso bajo la dirección del Sr. Antonio Rodeja, director del "Grupo Escolar" local.

Han sido editadas en Barcelona, varias series de sellos esperantistas sobre motivos tan actuales como, los Juegos Olímpicos de Roma y el Congreso de Esperantistas Ferroviarios, este último a celebrar en nuestra ciudad el año próximo. El - editor de dichos sellos, es el Sr. Moreno Medrano, impresor. Le felicitamos por la calidad y colorido etc. de los mencionados sellos.

Efectuaron una visita al Grupo Esperantista de Sabadell los samideanos Veciana, Bienvenido, y Cuñat, este último redactor de este boletín. Fueron cordialmente acogidos y atendidos por Llibert Puig, así como por nuestro delegado Ramón Alberich. Con tal motivo, se aprovechó la ocasión para hablar y tratar sobre el Movimiento Esperantista en Sabadell y Barcelona. Los visitantes adquirieron varios libros en el "Libroservo" local. El samideano Puig, despues de ofrecer un refresco a los visitantes, pasó a enseñarles las esplendidas - dependencias de la Cooperativa la Sabadellense, donde tiene sede el grupo local de E-to.

NE "VORTOJ" SED "FRAZOJ "

Antaŭ nur 50 jaroj, ankoraŭ malmultaj instruistoj pri lingvoj konsentis, ke ili devis lernigi precipe frazojn, ne vortojn.

Komence, temu pri la plej mallongaj kaj simplaj frazoj tuj uzeblaj: bonan tagon, bela virino, forta viro, ĝis revido, blanka papero, nigra inko, ruĝa krajono, alta monto, mi estas Johano Rodriguez, ŝi estas Johanino Petersen, la tablo staras sur la planko, la libro kuŝas sur la tablo, la kato kuŝas sub la tablo, mi sidas sur la seĝo, ktp.

En frazoj vivas kaj difiniĝas la vortoj, kaj tial oni lernas ilin pli facile kaj efike. Sed antaŭ nur duona jarcento, plej multaj instruistoj pensis, ke per gramatikaj reguloj kaj serioj aŭ listoj da vortoj, ili povis lernigi fremdan lingvon. Eĉ en la logika Esperanto, tia metodo ne estas deca trafa ĉar la lernanto faros tiam per la vortoj, la Esperantajn frazojn, ne laŭ la spirito kaj logiko de la nova lingvo sed de sia nacilingvo. Italo salutus per kiel al vi iras?; germano: kiel iras ĝi al vi?; anglo: kiel faras vi faras?; franco: kiel vin portas vi?; hispano: kiel estas vi?, ktp., anstataŭ kiel vi fartas.

En franca lingvo, se ne en frazo, kie ĝia senco iel preciziĝas, kion signifas ekz-e, bout? en angla, set?

Neniu ordinara hispano, anglo, germano, povas fari francajn frazojn. Ekzistas -korektaj, naturaj- nur tiuj faritaj de la franco; kaj nur per tiuj frazoj devas paroli fremdulo, se li volas esti komprenata de francoj.

Ne laŭ la nombro da vortoj, sed da frazoj, oni povas paroli fremdan lingvon komprenebla, oni povas dece ĝin paroli.

Eĉ se oni posedas klarajn konceptojn pri substantivo, adjektivo, adverbo, k.t.p., oni povas flue esprimi sian penson, se oni samtempe devas atenti la gramatikan kategorion de ĉiu vorto uzata, uzinda. Francaj knaboj korekte, gramatike, uzas ekz-e gai, gaiement, gaieté antaŭ ol ili lernis, kiu el tiuj vortoj estas adjektivo, adverbo aŭ substantivo, ĉar ili ja aŭdis, komprenis, asimilis unue la esprimojn jouer avec gaité, jouer gaiement, visage gai, t.e., ludi kun gajo, gaje gajelludi, gaja vizaĝo.

Ju pli multaj korektaj frazoj lernitaj de vi, des pli multe vi povos dece esprimi ideojn, kaj des pli senteblaj fariĝos **la gramatikaj kategorioj por spontana apli-kado** de la finiĝo _o_ al substantivoj, _a_ al adjektivoj, _i_ al verboj, _e_ el adverboj.

Nur kiam ekzistis jam multaj gravaj verkoj en Esperanto, oni povis sufiĉe analizi por fari, eltivi, plenan gramatikon de nia ligvo kaj plenan vortaron kun certa precizigo pri uzoj de ĉiu vorto.

Multe legu bonajn verkojn, kaj en la Plena Vortaro la frazojn praktike klarigajn pri la senco de ĉiu vorto. Tiel vi penetros la faktan gramatikon - bazo por kompreni la teorian gramatikon, kiam vi legos ĝin. Jen pedagogia orientado por moderna lernado kaj instruado de la Zamenhofa lingvo, kaj de ĉiu lingvo.

Waringhien, eminenta esperantologo, trafe diris, ke sen kreita lingvo, kreita de Zamenhof per tradukado de ĉefaj ver-koj el la grandaj literaturoj, Esperanto estus pala teoria fantomo, kiel multaj aliaj projektoj de lingvo internacia.

Se vi volas rapide lernigi lingvon, memoru ke unuopaj vortoj estas nur vortoj senrilataj, senvivaj, ke se vi lernig frazojn, vi lernigas ne nur vivantajn vortoojn, sed praktikan vivantan gramatikon, lingvon.

Kaj la lingvon kreadas kaj evoluigas ne la gramatikistoj aŭ leksikologoj, sed la bonaj verkistoj kaj oratoroj, kiuj klo-podas plej multe esprimi ĉiam pli bele kaj pli klare. La gramatikistoj nur konstatas kaj konstatigas la lingvajn feno-menojn. Do, ĉiam: unue la lingvo: poste la gramatiko, ĉu en elementa grado, ĉu en supera.

Delfí Dalmau. (El Kulturaj Kejeroj)

===

PROVERBOJ

Virino scias, tuta mondo scias

Eminenta ŝuldanto, malbona paganto

Kiom da kapoj, tiom da opinioj

Fajron estingas akvo, pekon pardono

Lupo ŝanĝos la harojn, sed ne la farojn

## - HUMORAĴOJ KAJ ANEKDOTOJ -

- Frederiko la Granda amis disputojn kaj havis la kutimon fini ilin per ekbato de piedo en la genuon de la kundisputanto. Unu fojon, havante fortan deziron disputi, li demandis korteganon, kial li ne diras al li sian veran opinion.
- Estas maloportune, respondis tiu-ĉi, diri siajn opiniojn al reĝo, kiu havas tiajn fortikajn konvinkojn kaj tiajn solidajn botojn.

- - - - - -

- Temistoklo edzinigis sian filinon je homo tre bona, sed malriĉa, "ĉar, li diris, mia filino pli volas homon sen havaĵo ol havaĵon sen homo".

- - - - - -

MERITPLENA SERVO: Kial vi donis tiel grandan trinkmonon al la servantino de la vestgardejo?- demandas iu sinjorino al sia edzo.
- Nu, ĉu vi ne vidas, kian belan ĉapelon kaj multekostan surtuton ŝi donis? Ŝi tamen meritas ekstran rekompencon!

EDZA KONDIĈO: Edzino: Vidu, karulo, ĉu mi ne aĉetu tiun ĉarman ĉapelon? Ĝi estas laŭ la lasta modo.
- Edzo: Se efektive ĝi estos la "lasta modo", mi konsentas.

EN RESTORACIO: Kelnero! vi alportis al mi azenan viandon; mi ĝin ne volas.
- Pardonu, sinjoro; ĝi estas bovida.
- Ĝi estas azena, mi estas certa.
- Vi estas malprava, sinjoro- diras la kelnero - se ni buĉus la azenojn, nia restoracio estus baldaŭ malplena.

INTER AMIKOJ: Tiuj ĉiamaj ŝercoj pri la bopatrinoj estas tre maljustaj. Mi tute bone rilatas kun mia bopatrino.
- Ĉu ŝi loĝas ĉe vi ?
- Ne; eksterlande.

KOMFORTA PENSIONO: Se mankos io al vi, kion vi volonte havus,- diras la mastrino de la pensiono al sinjoro, kiu ĵus luis ĉambron,- tiam vi povos voki min, kaj mi montros al vi, kiel vi povos fari sen tio.

ASEKURO- Ĉu vi ne volas asekuri vin kontraŭ ŝtelo?
- Kial? Mi ŝuldas al mia mastrino jam de ses monatoj la lupagon kaj ŝi jam atentas ke neniu forportu ion el mia posedaĵo.

# JUNULARO BRITA ESPERANTISTA

## Al la Redakcioj de la Esperatistaj Junulargazetoj.

Karaj geamikoj!

Dum la pasintaj monatoj la Junularo Esperantista Brita klopodis diskonigi sian novan bultenon, "Kial Ne?", per senpaga sendado de ekzempleroj al alilandaj junularaj sekcioj ktp. Ni esperas, ke nia bulteno plaĉas al vi (kaj se ĝi ne plaĉas, skribu al ni klarigante la kialon), kaj ke vi volos ankoraŭ ricevi ĉiun numeron aperontan.

Pro tiu kaŭzo, ni proponas al vi unu el la jenaj sugestoj
- 1.Interŝanĝo: Ni volonte interŝanĝos nian bultenon kontraŭ bulteno de alia landa junulara sekcio (tiu ĉi aranĝo jam ekzistas inter ni kaj i.a. Nederlando, Hispanio, Ĉeĥoslovakio, kaj Germanio) aŭ kontraŭ alia Esperantista gazeto kiu enhavas ion aparte interesan al gejunuloj.
- 2.Abono: Estas nun eble, aboni nian bultenon. Ĝi kostas ses ŝilingojn (aŭ egalvaloron) ĉiujare. Aperas dum unu jaro ses numeroj. Tiuj kiuj jam vidis la kvar numerojn, kiujn ĝis nun aperigis, certe rimarkis la daŭran kreskon kaj pliboniĝon de la bulteno. Ĝi nun enhavas pli da paĝoj, pli da interesaj artikoloj, kaj pli da informoj. Tiu ĉi progreso ne haltos: ni deziras, ke ĉiu numero estu pli bona ol la antaŭaj.

Al tiuj sekcioj kaj gazetoj, kun kiuj ne ekzistas interŝanĝaranĝo, ni emfazas la gravecon de kunlaboro kaj kunhelpo. Ni volonte interŝanĝos nian bultenon kontraŭ la via, aŭ, en landoj kie ne ekzistas junular-bulteno, kontraŭ nacia Esperanta gazeto, kiu enhavas junulan rubrikon aŭ ion interesan al la junularo. Ni ne plu, tamen, povos daŭrigi la sendon de nia bulteno al vi sen interŝanĝa aŭ abona aranĝo. Faru vian eblon, kaj helpu nin fari la nian.

Amike kaj samideane via, "La Redakcio de "Kial Ne?".

Korespond-adreso por JEB kaj "Kial Ne?":
S-ro H.R. Tonkin, St John's College, CAMBRIDGE, Anglujo.

## PREZIDANTO DE H.E.J.S. EDZIĜIS

La 25-an de junio 1960 edziĝis nia prezidanto Salvador Aragay al F-ino Pepita Girona. La geedziĝo okazis en Barcelona. Ni deziras al la nova paro ĉion bonan kaj feliĉon.

==================================================================

## NI FUNEBRAS KAJ KONDOLAS

En Barcelona, mortis la 27-an de aŭgusto, la patro de nia fervora kaj kara kunlaboranto Joan Lluis Vallés.

Profunde kortuŝis nin la funebra sciigo. Ni esprimas al nia kara amiko kaj ties familianoj, niajn plej sincerajn kondolencon.

==================================================================

## A V I S O   I M P O R T A N T E

De ahora en adelante, el boletín de HEJS aparecerá sólo cada dos meses, en vez de cada mes como habíamos hecho desde el principio. Lamentamos no poder mantener nuestro propósito inicial; por falta de suficientes medios económicos nos vemos obligados a tomar esta medida. Confiamos no obstante, en seguir contando con el fervor de nuestros asociados, como hasta ahora.

GRAVA AVIZO"Ni sciigas al ĉiuj niaj legantoj, ke pro ekonomiaj malfacilaĵoj, nia bulteno aperos de nun, nur ĉiu du monatoj, anstataŭ monatê kiel ĝis nun.

==================================================================

## - ANTE UNA NUEVA CAMPAÑA -

Pasada la época del verano, se reaniman las actividades en los grupos esperantistas. Todo hace esperar que nuevas y fructíferas actividades, serán emprendidas en pro de la difusión del Esperanto. Podemos anticipar que en Julio y en el grupo "Antaŭen" de Barcelona, se celebraron reuniones de samideanos dispuestos a dirigir cursos. En dichas reuniones se discutió sobre los métodos a usar y la mayoría votó por el ya famoso Cs-método.